

SK-14/10

DANIEL QUARELLO

*Quarelo*

# LERNU ESPERANTON



- Predikato.*
- Akuzativo.*
- Transitivaj kaj netransitivaj verboj.*
- Atributo de l' verbo.*
- Konstruo.*
- Komuna dativo.*
- Aliaj klasoj de dativo.*
- Kazo dativo.*
- Kazo agantivo.*
- Aktiva voĉo kaj pasiva voĉo.*
- Mediala voĉo.*
- Deklinacio.*

QUARELLO & Cía.

Eldonistoj

Buenos Aires

6925

DANIEL QUARELLO

# Breve Historia del Esperanto



*Necesidad de una lengua  
Internacional, Neutral, Auxiliar.*

*En busca de una lengua  
Internacional, Neutral, Auxiliar.*

*Hallazgo de la lengua  
Internacional, Neutral, Auxiliar.*

*Aprenda el Esperanto.*

*Sobre el camino de los triunfos.*

*Fundamento del Esperanto.*

*Las 16 reglas de Zamenhof, fundamentales  
e intangibles.*

*Prezo: \$ 0,30 argentina mono aŭ du internaciaj respondkuponoj*

**QUARELLO & Cía.**

**Eldonistoj**

Buenos Aires

DANIEL QUARELLO

# LERNU ESPERANTON

*Ekstrakto el la verko  
LERNU ESPERANTON  
libro dediĉita al tiuj, kiuj  
deziras koni ĝisfunde,  
paroli korekte kaj  
skribi perfekte  
nian lingvon.*



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

QUARELLO & Cía.

Eldonistoj

Casilla de Correo 47 (Suc. 13)

BUENOS AIRES

DANIEL QUARELLO

TERMIN  
Cini rajtoj rezervitaj.  
Todos los derechos reservados.

ESPERANTO  
Hecho el depósito legal.

Copyright by Daniel Quarelo.  
Buenos Aires, 1947.  
Kopirajto de Daniel Quarelo.  
Bonaero, 1947.

LIBRO DE ESERANTO

Ĉi tiu ĉi libro estas dediĉita al la  
esperantistoj de ĉiuj landoj kaj  
lingvoj. Ĝi estas eldonita de  
la "Asocio de Esperantistoj de  
Bonaero".

ESPERANTO

Impreso en la Argentina  
PRESITA EN ARGENTINIO

## PREDIKATO

Legu :

La kamaradino *venas*.  
 La pastro *iris*.  
 La ĉevaloj *kuros*.  
 Iuj parencoj *staras*.  
 Iaj hundoj *kuŝis*.  
 Unu knabo *sidis*.  
 Vi *legos*.

Analizante ĉi tiujn propoziciojn, vi notas tuj, ke ĉiu konsistas el du distinktaj elementoj: la unu estas verbo, kaj la alia estas la persono de l' verbo. En la logika analizo de *Propozicio* la persono de l' verbo nomiĝas *nominativo*, kaj la verbo nomiĝas *predikato*.

"En la esprimaj entoj kun propozicia karaktero —klarigas Benot— la verbon (aŭ predikaton) koncernas la grava funkcio esprimi la *objekton* de l'propozicia diro.

"La verbo (aŭ predikato) manifestas, ja, *en ĉia okazo*, kion celas la parolanta persono, jen aserton, jen demandon, jen ordonon, k. t. p., k. e."

Sed ne ĉiam la predikato estas formata de unu verbo sola. Ekzemple, se oni diras:

Zamenhof *estis*.

vi notas tuj, ke la diro ne estas finita, ke la signifo de l'propozicio ne estas plena. Sed se oni aldonas adjektivon:

Zamenhof *estis granda*.

la penso restas kompletigita. Do, la adjektivo *granda*, kiu taŭgas por kompletigi la signifon de l' verbo, estas parto de l'predikato.

Esperanto *esta bela*.  
 Eŭropo *estas antikva*.  
 La edzino *estas bona*.  
 La bovo *estas forta*.  
 Ili *estas verdaj*.

La adjektivoj *bela, antikva, bona, forta, verdaj* kompletigas la signifon de l'verbo kaj apartenas al la predikato.

Alifoj la signifo de verbo estas kompletigata de substantivo:

Esperanto *estas lingvo*.  
 Eŭropo *estas kontinento*.  
 La edzino *estas kamaradino*.  
 La bovo *estas animalo*.  
 Ili *estas arboj*.

Ankaŭ la substantivoj *lingvo, kontinento, kamaradino, animalo, arboj* estas parto de l'predikato.

Krome estas ankoraŭ alia klaso de predikato formata de du verboj: la unu persona kaj la alia infinitivo. Jen ekzemple:

La kamaradino *deziras veni*.  
 La pastro *volis iri*.  
 La ĉevaloj *komencos kuri*.  
 Iuj parencoj *devas stari*.  
 Pluraj knaboj *povis sidi*.  
 Ŝi *finos labori*.

La infinitivoj *veni, iri, kuri, stari, sidi, labori* kompletigas respektive la signifon de l'personaj verboj *deziras, volis, komencos, devas, povis, finos*. Do, ankaŭ ili estas parto de l'predikato.

Ankaŭ tie ĉi vi vidos, kiel la predikato, formata de persona verbo kun infinitivo, povas necesi la aldonon de adjektivo por kompletigi sian signifon:

Edzino *devas esti bona*.  
 La fenestro *devos esti alta*.  
 Karlo *penas esti gentila*.

Alifoj estas substantivo, kiu kompletigas la signifon de predikato formata de persona verbo kun infinitivo:

Edzino *devas esti kamaradino*.  
 Marjo *povus esti inĝeniero*.  
 La studento *volas fariĝi kapitano*.

La grupo de vortoj *devas esti bona, devos esti alta, penas esti ĝentila*, kaj *devas esti kamaradino, povus esti inĝeniero, volas fariĝi kapitano* formas kune la predikaton de siaj respektivaj propozicioj.

### Ekzemploj:

Operejo estas teatro. — Opero estas bela spektaklo. — Forĝejo estas laborejo. — Orangejo estas kampo. — Aŭtejo estas domo. — Lavejo estas laborejo. — Herbejo estas kampo. — vendejo estas domo. — Teatro estas ejo. — Domo estas ejo. — Romo estas urbo. — Romo estas grandioza. — Romo estas urbo grandioza. — Romo estas grandioza urbo. — Romo estas la grandioza urbo.

La homo parolas. — La bebo krias. — La animalo blekas. — La hundo bojas. — La kato miaŭas. — La bovo mugas. — La porko gruntas. — La ĉevalo henas. — La ŝafo beas.

La homo povas paroli. — La bebo volas krii. — La animalo povas bleki. — La hundo volas boji. — La kato komencas miaŭi. — La bovo komencas muĝi. — La porko finas grunti. — La ĉevalo finas heni. — La ŝafo finas bei.

## 2

### AKUZATIVO

Analizu:

La junulo legis.

De kiu oni asertas la legadon en ĉi tiu propozicio? — De l'junulo. Do, la junulo estas la *nominativo*, t. e. la *persono de l'verbo*.

Li semas.

Kiu semas? — Li. Do, li estas la *nominativo*, t. e. la *persono de l'verbo*.

La virino kantos.

Kiu kantos? — La virino. Do, la virino estas la *nominativo*, t. e. la *persono de l'verbo*.

La infano manĝas.

Kiu manĝas? — La infano. Do, la infano estas la *nominativo*, t. e. la *persono de l'verbo*.

Multfoje manifestiĝas ankaŭ kiun trafas aŭ sur kion falas la objekto esprimita de l'verbo kaj plenumita de l'nominativo, kiel ekzemple:

La junulo legis gazeton.

Kion legis la junulo? — Gazeton. Do, *gazeton* estas la *akuzativo*, t. e. *la paciento de l' verbo*.

Li semas tritikon.

Kion semas li? — Tritikon. Do, *tritikon* estas la *akuzativo* t. e. *la paciento de l' verbo*.

La virino kantas kanzonon.

Kion kantas la virino? — Kanzonon. Do, *kanzonon* estas la *akuzativo*, t. e. *la paciento de l' verbo*.

La infano manĝas la supon.

Kion manĝas la infano? — La supon. Do, *la supon* estas la *akuzativo*, t. e. *la paciento de l' verbo*.

Daŭru analizi:

La junulo komencis legi gazeton.

Kion komencis legi la junulo? — Gazeton. Do, *Gazeton* estas la *akuzativo*, t. e. *la paciento de l' verbo*.

Li finas semi tritikon.

Kion finas semi li? — Tritikon. Do, *tritikon* estas la *akuzativo*, t. e. *la paciento de l' verbo*.

La virino volas kanti kanzonon.

Kion volas kanti la virino? — Kanzonon. Do, *kanzonon* estas la *akuzativo*, t. e. *la paciento de l' verbo*.

La infano deziras manĝi la supon.

Kion deziras manĝi la infano? — La supon. Do, *la supon* estas la *akuzativo*, t. e. *la paciento de l' verbo*.

Esperanto, lingvo perfekta laŭ klaro kaj logikeco, ne lasas ian konfuzon ebla inter kiu plenumas la objekton esprimitan de l'predikato



kaj kiu suferas ĝin; ĝi distingas la akuzativon dis de l'nominativo per aldono de —N al la vorto en akuzativo.

**Ekzemploj:**

Mi vizitis la operejon. — La ŝoforo kondukas la aŭton. — La pastro prenas la plumingon. — La parencoj aĉetas elgaringon. — La oficiro portas la glavington. — Oni ingis la glavon. — La soldatoj malingis la bajoneton. — La infanoj rompis kandelington. — Komo estas la eterna urbo. — La eterna urbo estas Romo. — Ingo estas objekto.

La najtingalo kantas. — La leono blekas. — La birdo trilas. — La turto kveras. — La koko kikerikas. — La kokino kuklas. — La kolombo rukulas. — La abelo / kaj la muŝo zumas (= La abelo zumas, / kaj la muŝo zumas.)

La najtingalo povas kanti. — La leono povas bleki. — La birdo volas trili. — La turto komencas kveri. — La koko komencas kikeriki. — La kokino finas kukli. — La kolombo finas rukuli. — La abelo / kaj la muŝo volas zumi (= La abelo volas zumi, / kaj la muŝo volas zumi.)

3

**TRANSITIVAJ KAJ NETRANSITIVAJ VERBOJ**

Ankaŭ la nomo de personoj kaj animaloj povas stari en akuzativo:

Mi salutis Esperantiĉan.  
La patrino amas la fileton.

Gabrielo povis kapti birdon.  
Ili povis konduki la azenon.

Staras en akuzativo la vorto, kiu respondas al la demandoj *«Kio? ...? Kiu...?»*

La verboj regantaj akuzativon nomiĝas *transitivaj*, ĉar la objekto de ili esprimata estas plenumata de l'nominativo kaj ĝia efiko aŭ rezultato estas ricevata aŭ suferata de l' akuzativo.

''Pere de transitiva verbo —esplikas Benot— stariĝas inter la nominativo kaj la akuzativo rilato de *kaŭzo al efiko*:

Eraro instruas nin.  
Eraro povas instrui nin.

*de produktanto al produktato.*

Luizo *verkas* leteron.

Luizo *deziras verki* leteron.

*de modifanto al modifato.*

Anna *gladis* la ĉemizojn.

Anna *volis gladi* la ĉemizojn.

Danke al karakteriza signo de l'akuzativo —N Esperanto, fleksebla kiel neniu alia lingvo, permesas al la parolado ordoliberon tian, ke ĝi povas liveri ajn literaturan figuron kun esprimoforto preciza kaj neta, akompanata de kolorriĉo trafa kaj brilega:

La patrino *amas* la fileton.

La patrino la fileton *amas*.

La fileton la patrino *amas*.

La fileton *amas* la patrino.

Sed ne ĉiuj verboj esprimas objekton, kiu plenumata de l'nominativo pasas al la akuzativo, kiu ĝin ricevas aŭ suferas. Estas verboj, kiuj indikas nur kion sentas, aŭ spertas aŭ plenumas la nominativo en maniero finita. Ekzemple:

Esperantina *venos*.

Esperantina *devos veni*.

Leono *blekas*.

Leono *povas bleki*.

Ĉi tie la objekto ne eliras de l'nominativo, kiu plenumas ĝin; la verbo aŭ predikato de l'propozicio esprimas la objekton de l'nominativo en maniero finita.

La verboj, kiuj regule ne havas akuzativon, nomiĝas *netransitivaj*, kaj ili povas formi predikaton solaj, kiel en:

Esperantina *sidas*.

Esperanto *sukcesis triumfi*.

aŭ akompanataj de adjektivo:

Esperantina *estas ĉarma*.

La fenestro *devos esti alta*.

aŭ akompanataj de substantivo:

Esperanto *estas* *lingvo*.  
Enriko *deziras* *fariĝi* *soldato*.

La adjektivoj kaj substantivoj akompanantaj la verbojn de predikato nomiĝas *predikataj atributoj* aŭ *verbaĵaj atributoj*; kaj la valoro de l'predikato sidas en la tuta grupo de vortoj kune konsiderataj, kaj ne en nur iu el siaj membroj.

Konklude, estas 4 klasoj de predikato kun atributo:

Esperantina <i>estas</i>	{	<i>ĉarma</i> . <i>knabino</i> .
Enriko <i>deziras</i> <i>fariĝi</i>	{	<i>utila</i> . <i>soldato</i> .

kaj 2 klasoj sen atributo:

La hundo	{	<i>bojas</i> . <i>volas boji</i> .	..
----------	---	---------------------------------------	----

Ĉi du lastaj klasoj de predikato, se ili estas formataj de *transitiva verbo*, povas regi akuzativon:

La kato	{	<i>kaptis</i> <i>volis kapti</i>	birdon.
---------	---	-------------------------------------	---------

*Ekzemploj:*

La najtingalo *movas* la *voston*. — La leono *atakas* la *ŝafon*. — La abelo *faras* *mielon*. — La koko *raspas* la *teron*. — La kokino *faras* *ovon*. — La kolombo *fariĝis* *neston*. — La homoj *portas* *veston*. — La animaloj *trinkas* *akvon*. — La hundo *mordis* la *katon*. — La katon *mordis* la *hundo*. — La bovo *trenas* la *plugilon*. — La ĉevalo *tiras* la *ĉaron*. — La flo-roj *havas* *parfumon*.

La najtingalo *povas movi* la voston. — La leono *sukcesis ataki* la ŝafon. — La abelo *povas fari* mielon. — La koko *finas raspi* la teron. — La kokino *devas fari* ovon. — La kolombo *deziras fari* neston. — La homoj *devas porti* vestom. — La animaloj *devas trinki* akvon. — La hundo *povis mordi* la katon. — La katon *povis mordi* la hundo. — La bovo *devas treni* la plugilon. — La ĉevalo *devas tiri* la ĉaron. — La floroj *povas havi* parfumon. — La najtingalo *estas bela*. — La leono *estas fiera*. — La abelo *estas ĉarma*. — La koko *estas vanta*. — La kokino *estas kvieta*. — La viroj *estas galantaj*. — La animaloj *estas utilaj*. — La hundo *estas fidela*. — La ĉevalo *estas forta*. — La bovo *estas fortega*.

Najtingalo *povas esti malbela*. — Leono *povas esti malfiera*. — Abelo *povas esti malĉarma*. — Koko *povas esti malvanta*. — Kokino *povas esti malkvieta*. — Viroj *povas esti malgalantaj*. — Animalo *povas esti malutila*. — Hundo *povas esti malfidela*. — Ĉevalo *povas esti malforta*. — Bovo *povas esti malforteга*.

4

## ATRIBUTO DE L'VERBO

Estas kvin klasoj de *nominativo* formataj de:

*substantivo*: (propra aŭ komuna nomo).

Zamenhof *estis granda*.

Skolto *ne devas esti malkuraĝa*.

La bovo *estas animalo*.

Edzino *devas esti kamaradino*.

*pronomo* (persona, poseda, montra, rilata aŭ demanda, kolekta, sendifina, nea):

Si *estas gaja*.

Vi *povas esti pli lerta*.

Ci tio *estas nia celo*.

Kiu nomiĝas *Enriko*.

*ajn vorto uzata kiel substantivo* (adverbo, prepozicio, konjunkteo, k. t. p.):

Ambaŭ *estas sanaj*.

Hieraŭ *estis festo*.

"Al" estas prepozicio.

"Kaj" estas la plej uzata konjunkcio.

infinitivo:

*Kritiki estas facile.*

*Fari estas malfacile.*

*Scii naĝi estas utilege.*

*Estas bone uzadi la vorton "je" kiel eble pli malofte.*

plena propozicio:

*Estus tre bele, / ke mi iru.*

*Estos pli bone, / se vi venos.*

*Estas konate, / ke Esperanto taŭgas por esprimi ĉiujn sentojn / kaj ideojn.*

Tufoje propozicio estas elipsita je l'nominativo aŭ je l'predikato aŭ je ambaŭ, kiam ĉi tiuj ĉefaj elementoj povas esti facile subkompreneataj el la senco de l'esprimo.

Tiel, por saluti oni diras:

bonan matenon.

„ „ tagon.

„ vesperon.

„ nokton.

kio signifas:

*Mi deziras al vi bonan matenon.*

„ „ „ „ „ tagon.

„ „ „ „ „ vesperon.

„ „ „ „ „ nokton.

Kelkaj propozicioj ne havas nominativon eĉ supozeblan. Precipe la verboj indikantaj naturajn fenomenojn uziĝas sen la persono de l'verbo, kiel ekzemple:

*Tagiĝas.*

*Ĉu pluvas?*

*Jam noktiĝis.*

*Forte ventas.*

Ĉe propozicio kun nominativo formata de substantivo (nomo, pronomo, aŭ ajn vorto substantivigita) kaj ĉe propozicio elipsa (kies nominativo estas subkomprenebla) la predikata atributo aŭ verba atributo estas adjektivo aŭ substantivo (finaĵo — *a* aŭ —*o*):

Tempo *estas valora*.  
 Tempo *estas mono*.  
 . . . . . *estas la kvara* (horo).

Sed ĉe propozicio kun nominativo formata de infinitivo aŭ plena propozicio kaj ĉe propozicio sen la persono de l' verbo (kies nominativo eĉ ne estas supozebla) la predikata atributo aŭ verba atributo prenas la finaĵon —*e* anstataŭ la finaĵo — *a*. Malofte ĉi tiu atributo estas substantivo (finaĵo —*o*):

*Malpermesate estas aŝi*.  
*Ne estas bone*, / ke la malsanuloj fumas tian fortan tabakon.  
*Ĉu estas varme / aŭ malvarme?*

Diri la veron *estas ĉies deo*.

### Ekzemploj:

*Vivi estas agi*. — *Estas necese* atendi. — *Estas sufiĉe* fari tiel. — Pensi libere *estas grande*, / sed pensi ĝuste *estas pli grande*. — Bone pensi / kaj bone agi *sufiĉas* por vivi bone / kaj feliĉe (= Bone pensi *sufiĉas* por vivi bone, / kaj ĝi *sufiĉas* por vivi feliĉe). — Bone agi *sufiĉas* por vivi bone / kaj ĝi *sufiĉas* por vivi feliĉe). — Amasigi / kaj gardi diversajn objektojn *estas tiam eble* (= Amasigi diversajn objektojn *estas tiam eble*). — Tiel fariĝis *eble* studi pli malnovan civilizon. — Ĉu *ne estus* al vi *agrabla* havi tian saman kapablon? — *Estos konvene*, / ke vi silentu. — *Estas nedubeble*, / ke tiu historia verko estas tre grava por nia movado. — Ke la nun ekzistantaj sovaĝuloj estas primitivuloj *ne estas pruvite*. — *Hodiaŭ estas bele*. — Hodiaŭ la vetero *estas bela*. — *Uraganos*. — *Blovos* malvarma uragano. — *Frostis*. — Frosto *ŝentiĝis akre*. — *Fulmas* / kaj *tondras*. — *Fulmo ekbrilis momente*, / kaj tondro *eksonis laŭtege*. — *Ne hajlas plu*. — La hajlo *ĉesis fali*. — *Pluvis* ŝtonoj. — Pluvo *falis dense*. — Bonan vojaĝon (= Mi *deziras* al vi bonan vojaĝon). — Gojan feston (= Mi *deziras* al vi gojan feston). — Kia goja festo (= Kia goja festo *estas hodiaŭ*)! — Batadi la venton (= Batadi la venton *estas senutila peno*). — Kiel trovi la tradicion (= Kiel *estos eble* trovi la tradicion)? —

Defendi la Esperantismon *estas ĝinda / kaj ĝinda devo* (= kaj ĝi estas ĝinda devo). — La aplaŭdoj *uragunis*. — La artilerio *londris*. — La kugloj *hajlis*. — Promeni *estas agrabla okupo*.

## 5

## K O N S T R U O

"La verbo (aŭ predikato) estas la gramatika formo esprimanta la objekton de ĉiu diro" — klarigas la genia lingvisto hispana Edvardo Benot— "Kaj efektive, kiam ni parolas, ni intencas konstante iun celon. Parolante ni havas ĉiam la objekton eldiri ion spertitan interne de nia psika esto kaj sentitan de l'konscio je l'momento de l'parolado. Nu, ĉiame la verbo (aŭ predikato) manifestas la objekton de l'eldiro. La verbo (aŭ predikato) estas la gramatika formo ekskluzive esprimanta la celon de ĉiu diro."

"Se mi perceptas fakton, fenomenon, konvenon, en la propozicio, per kiu mi manifestas kion mi perceptas, la verbo (aŭ predikato) indikas la objekton de mia eldiro, ĝi indikas, ke mi perceptas kaj kion mi perceptas."

La ĉefaj terminoj de propozicio aŭ, por pli bone diri, ĝiaj ĉefaj elementoj estas du:

*nominativo kaj predikato*

kiuj korespondas al la nepraj elementoj, kiuj partoprenas en iu ajn juĝo, nome, la koncepto de iu ento: persono aŭ animalo, afero aŭ ideo, pri kiu ni diras ion, kaj la koncepto de tio, kion ni atribuas al la persono aŭ animalo, afero aŭ ideo, pri kiu ni parolas.

La unua elemento —*nominativo*— esprimiĝas per nomo aŭ substantivigita vorto, la dua —*predikato*— esprimiĝas per verbo, kies signifo povas esti kompletigita de adjektivo aŭ substantivo —*atributo*.

Sed notu al vi, ke nur la voĉoj kun la *finajoj* —*as*, —*is*, —*os*, —*u*, —*us* estas *predikataj verboj*. La infinitivo (finajo —*i*) estas verba voĉo sen persono kaj neŭtra je tempo, kiu plenumas helpan funkcion riĉigante la predikatan grupon de l'esprimoj *pov—, dezir—, vol—, komenc—*, k. t. p.

Ĉe ne-transitivaj verboj la signifo de l'verbo ne eliras —ne transiras— de l'nominativo, sed finiĝas en ĝi.

Kiam la verbo estas transitiva, la objekto pasas —transiras— de l'nominativo *rekte* al la akuzativo. Pere de transitiva verbo la kazoj

nominativa kaj akuzativa de unu propozicio estas ligataj kun rilato de aganto al ricevanto. Inter la du kazoj de unu propozicio kreiĝas interdependo de efiko en rilato kun sia kaŭzo, kaj de kaŭzo en rilato kun sia efiko, kiu estas starigata de l'objekto kaj voĉo de l'verbo.

Konsideri la trafan rimedon uzatan de Esperanto por distingi la akuzativon dis de l'nominativo estas konfirmi la konvinkon, ke mi kaj vi, afablaj legantoj kaj ĝentilaj Esperantinaj, jam fari al ni pri l'supereco de ĉi tiu eksterordinara lingvo.

Por signali la akuzativon estas du rimedoj: aŭ, kiel en preskaŭ ĉiuj eŭropaj idiomoj, la propozicio observas difinitan ordon, la nominativo antaŭe kaj la akuzativo poste de l'verbo, aŭ per karakteriza signo kiu, kiel en Esperanto, ĝuas la avantaĝon lasi plenan liberon ordigi la elementojn de propozicio laŭ la maniero plej trafa.

Por fini, notu ankoraŭ, ke la transitivaj verboj povas uziĝi sen akuzativo:

*Sen akuzativo.*

Rikardo *skribas*.  
La patrino *amas*.  
Anna *gladis*.

*Kun akuzativo.*

Rikardo *skribas* leteron.  
La patrino *amas* la fileton.  
Anna *gladis* la ĉemizojn.

## 6

### KOMUNA DATIVO

Analizu:

La junulo legis gazeton *al* la avo.

Al kiu la junulo legis gazeton? — Al la avo. Do, *al* la avo estas la *dativo*, t. e. *la persono al kiu sin direktas la objekto de l'verbo*.

Rikardo skribos leteron *al* siaj gepatroj.

Al kiuj Rikardo skribos leteron? — Al siaj gepatroj. Do, *al* siaj gepatroj estas la *dativo*, t. e. *la personoj al kiuj sin direktas la objekto de l'verbo*.

Li donacis la pupon *al* Elena.

Al kiu li donacis la pupon? — Al Elena. Do, *al* Elena estas la *dativo*, t. e. *la persono al kiu sin direktas la objekto de l'verbo*.



Cefanja promesis novan lingvon puran *al la popolo*.

Al kiu Cefanja promesis novan lingvon puran? — Al la popolo. Do, *al la popolo* estas la *dativo*, t. e. *la personoj al kiuj sin direktas la objekto de l' verbo*.

Daŭru aĥalizi:

La junulo komencis legi gazeton *al la avo*.

Al kiu la junulo komencis legi gazeton? — Al la avo. Do, *al la avo* estas la *dativo*, t. e. *la persono al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*.

Rikardo devos skribi leteron *al siaj gepatroj*.

Al kiuj Rikardo devos skribi leteron? — Al siaj gepatroj. Do, *al siaj gepatroj* estas la *dativo*, t. e. *la personoj al kiuj sin direktas la objekto de l' verbo*.

Li ne volis donaci la pupon *al Elena*.

Al kiu li ne volis donaci la pupon? — Al Elena. Do, *al Elena* estas la *dativo*, t. e. *la persono al kiu ne sin direktas la objekto de l' verbo*.

Cefanja povis promesi novan lingvon puran *al la popolo*.

Al kiu Cefanja povis promesi novan lingvon puran? — Al la popolo. Do, *al la popolo* estas la *dativo*, t. e. *la personoj al kiuj sin direktas la objekto de l' verbo*.

Ankaŭ la nomo de animaloj kaj aferoj povas stari en *dativo*:

Mi aplikis la teorion *al la praktiko*.

Al kio mi aplikis la teorion? — Al la praktiko. Do, *al la praktiko* estas la *dativo*, t. e. *la afero al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*.

Mi kapablis apliki la teorion *al la praktiko*.

Al kio mi kapablis apliki la teorion? — Al la praktiko. Do, *al la praktiko* estas la *dativo*, t. e. *la afero al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*.

Staras en dativo la parolo, kiu respondas al la demandoj: *Al kiu...?*  
*Al kio...?*

### Ekzemploj:

La kolonelo pagis la ŝuojn *al la viro*. — La aktoro donacis dolĉaĵon *al la knabino*. — La tajlorino faros veston *al mia kuzino*. — Kion donis ili *al la kamarado*? — *Al la kamarado* ili donis monon. — *Al kiu* ili donis la sukeraĵon? — Ili donis la sukeraĵon *al la skolto*. — La kelnero malfermis la pordon *al la hundo*. — Portu tiun inkujon *al la ĉefo*. — Oni montros ĉiujn belajojn *al la amikino*. — Ĉu Marta ne volis fari agrablajn *al sia bofratino*? — La profesoro vendis prabeston *al la muzeo*. — Iu eksministro prezentis la dokumenton *al la publiko*. — Mi sendis leteron *al lia episkopa moŝto*, / kaj alian *al lia grafa moŝto* (= kaj mi sendis alian leteron *al lia grafa moŝto*). — La fianĉo / kaj la fianĉino amas unu *al la alia* (= unu amas *al la alia*). — Viroj batas unu *al la alia* (= unu batas *al la alia*).

La serpento *ne povas fajfi*, / sed ĝi *siblas*. — Elefanto *ne povas sibli*, / sed ĝi *trumpetas*. — La kapro *ne povas trumpeti*, / sed ĝi *mekas* / aŭ *mekmekas*. — Korvo *ne povas meki*, / sed ĝi *grakas*. — La rano *ne povas graki*, / sed ĝi *kvakas*. — Grilo / kaj cikado *ne povas kvaki*, / sed ili *ĉirpas* (= Grilo *ne povas kvaki*, / sed ĝi *ĉirpas*. / kaj cikado *ne povas kvaki*, / sed ĝi *ĉirpas*). — La muso *ne povas ĉirpi*, / sed ĝi *cincas*.

## 7

### ALIAJ KLASOJ DE DATIVO

Analizu:

Li semas tritikon *por ni*.

Por kiuj li semas tritikon? — Por ni. Do, *por ni* estas la *dativo*, t. e. *la personoj favore al kiuj sin direktas la objekto de l' verbo*.

La onklo aĉetis pomojn *por sia nevo*.

Por kiu la onklo aĉetis pomojn? — Por sia nevo. Do, *por sia nevo* estas la *dativo*, t. e. *la persono favore al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*.

La mastrino ne povis kuiri la ovojn *por la kliento*.

Por kiu la mastrino ne povis kuiri la ovojn? — Por la kliento. Do, *por la kliento* estas la *dativo*, t. e. *la persono favore al kiu ne sin direktas la objekto de l'verbo*.

Tiuj sinjorinoj deziras peti monon *por la preĝejo*.

Por kio tiuj sinjorinoj deziras peti monon? — Por la preĝejo. Do, *por la preĝejo* estas la *dativo*, t. e. *la afero favore al kiu sin direktas la objekto de l'verbo*.

Staras en *dativo* la parolo, kiu respondas al la demandoj: *Favore al kiu...? Favore al kio...?*

Dismembrigu:

La virino kantas kanzonon *kontraŭ la modo*.

Kontraŭ kio la virino kantas kanzonon? — Kontraŭ la modo. Do, *kontraŭ la modo* estas la *dativo*, t. e. *la afero malfavore al kiu sin direktas la objekto de l'verbo*.

Oni ne faru maljustaĵon *kontraŭ iu*.

Kontraŭ kiu oni ne faru maljustaĵon? — Kontraŭ iu. Do, *kontraŭ iu* estas la *dativo*, t. e. *la persono malfavore al kiu ne sin direktas la objekto de l'verbo*.

Ili ne ĉesis peti helpon *kontraŭ la lupo*.

Kontraŭ kiu ili ne ĉesis peti helpon? — Kontraŭ la lupo. Do, *kontraŭ la lupo* estas la *dativo*, t. e. *la animalo malfavore al kiu sin direktas la objekto de l'verbo*.

La fraŭlo daŭras senti malamon *kontraŭ la fraŭlino*.

Kontraŭ kiu la fraŭlo daŭras senti malamon? — Kontraŭ la fraŭlino. Do, *kontraŭ la fraŭlino* estas la *dativo*, t. e. *la persono malfavore al kiu sin direktas la objekto de l'verbo*.

Staras en *dativo* la parolo, kiu respondas al la demandoj: *Malfavore al kiu...? Malfavore al kio...?*

Malmuntu; *la infano manĝas la supon por kreski.*

La infano manĝas la supon *por kreski.* — Por kio la infano manĝas la supon? — Por kreski. Do, *por kreski* estas la *dativo*, t. e. *la celo al kiu sin direktas la objekto de l'verbo.*

La sacerdoto prenis la brevieron *por preĝi.*

Por kio la sacerdoto prenis la brevieron? — Por preĝi. Do, *por preĝi* estas la *dativo*, t. e. *la celo al kiu sin direktas la objekto de l'verbo.*

Ĉiuj devas porti sian verdan stelon *por propagando.*

Por kio ĉiuj devas porti sian verdan stelon? — Por propagando. Do, *por propagando* estas la *dativo*, t. e. *la celo al kiu sin direktas la objekto de l'verbo.*

La junulo volis ĉerpi akvon *por trinki.*

Por kio la junulo volis ĉerpi akvon? — Por trinki. Do, *por trinki* estas la *dativo*, t. e. *la celo al kiu sin direktas la objekto de l'verbo.*

Staras en *dativo* la parolo, kiu respondas al la demando: *Por kio...?*

### Ekzemploj:

Li amas *Marian*. — Li sentas amon *al Maria*. — Li sentas amon *por Maria*. — Si malamas *Martan*. — Si sentas malamon *kontraŭ Marta*. — La prelatu prenos la plumington *por skribi*. — Donu *al mi* panon. — Portu akvon *por la kanurio*. — Monsinjoro Andreo faros predikojn *kontraŭ tiu moro*. — Niaj prapatroj mizere kulturis la teron *por vivi*. — Al leono ne donu la manon. — Berta kolektis monon *por nia klubo*. — Sia advokato prezentis proteston *kontraŭ tiu decido*. — Ni faras ĉi tion *por danki*. — La fraŭlino lasis la laboron *por iri promeni*.

Eliza estas *honesto*. — Sia honesteco estas *tre granda*. — Sia ago estas *admirinda honestaĵo*. — Tia honestaĵo *pruvas sian* ŝatindan honestecon. — Provo *pruvas* tion. — Homo, / kiu *ne povas vidi*, / estas *blinda*. — Homo, / kiu *ne povas paroli*, / estas *muta*. — Homo, / kiu *ne povas aŭdi*, / estas *surda*. — *Kia* estas la glaso? — La glaso estas *malplena*. — *Kia* estas la glaso? — La glaso estas *plena*. — *Kiu* estas la glaso? — La glaso estas *malpura*.

## 8

## KAZO DATIVO

En propozicio la dativo indikas *la personon, animalon aŭ aferon al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*. Ĉi tiu dativo nomiĝas *komuna*:

La junulo legis gazeton *al la avo*.  
La junulo komencis legi gazeton *al la avo*.

La dua klaso de dativo indikas *la personon, animalon aŭ aferon favore al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*. Ĉi tiu dativo nomiĝas *favora*:

Li semas tritikon *por ni*.  
Li finas semi tritikon *por ni*.

La tria klaso de dativo indikas *la personon, animalon aŭ aferon malfavore al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*. Ĉi tiu dativo nomiĝas *malfavora*:

La virino kantos kanzonon *kontraŭ la modo*.  
La virino volos kanti kanzonon *kontraŭ la modo*.

La kvara klaso de dativo indikas *la personon, animalon aŭ aferon al kiu sin direktas la objekto de l' verbo*. Ĉi tiu dativo nomiĝas *cela*:

Ĉiuj portas sian verdan stelon *por propagando*.  
Ĉiuj devas porti sian verdan stelon *por propagando*.

Estas ĉi tiu lasta la unika dativo, kiu povas formiĝi ankaŭ per infinitivo:

Ĉiuj portas sian verdan stelon *por propagandi*.

Se ĉi tiu infinitivo estas transitiva, ĝi povas havi ankaŭ akuzativon:

Ĉiuj devas porti sian verdan stelon *por propagandi Esperanton*.

En la ekzemploj ĝis nun analizataj ni vidis la kazojn dativo kaj aku-

zativo kune en la sama propozicio. Sed samkiel akuzativo povas stari sola en propozicio sen dativo, ankaŭ dativo povas stari sola en propozicio sen akuzativo:

Venis fino *al mia latinaĵo*.  
Ĉu vi parolis *al la bofilo?*

Ĉiu estas *por si*, / *por ĉiuj* estas Di'.  
Tiu libro estas *por Maria*.

Dubo gardas *kontraŭ risko*.  
La gvardio devis batali *kontraŭ la banditoj*.

Milda venis *por triki*.  
La milda fraŭlino venis *por tiu celo*.  
La maljunulino venis *por lerni trikadon*.

Ankaŭ predikato kun atributo povas havi dativon:

Ĉio estas favora *al la geedzoj*.  
Paco estas utila *por la nacioj*.  
Oni devas esti maljusta *kontraŭ neniu*.  
Li estas tro fiera *por obci*.

Kiel vi vidis per la ekzemploj supre citataj, ankaŭ netransitivaj verboj povas havi dativon.

Iafoje en la sama propozicio povas esti pli ol unu dativo:

La kleriko aĉetis *al Marko* la librojn *por la orfo*.  
La Esperantismo devis batali *kontraŭ malkompreno / por venki*.

La esprima valoro de l'dativo sidas en la tuta grupo de vortoj kune konsiderataj (prepozicio + substantivo, aŭ prepozicio + infinitivo) kaj ne en nur iu el siaj membroj.

Kiam la nomo estas akompanata de unu aŭ pluraj atributoj de l'substantivo kaj kiam la infinitivo havas akuzativon, ankaŭ tiuj estas parto de l'dativo.

#### *Ekzemploj:*

Lia heroeco tre plaĉis *al mi*. — Ĉiu amas ordinare personon, / kiu estas simila *al li*. — Diru *al mi* vian nomon. — Ĉu vi diros *al mi* la ve-

ron? — Montru *al ili* vian novan veston. — Petro rakontis *al Paŭlo* belan historion. — Ne skribu *al mi* tiajn longajn leterojn. — Ŝi rakontis *al li* sian tutan aventuron. — Ŝi rakontis *al li* lian tutan aventuron. — Milda deziras pardonon *al la maŝamiko* lian kulpon. — Mi aĉetis *al tiu sinjorino* la meblojn *por la geedzoj*. — Tiu afero estas facila *por vi*. — Unu ovo malbona tutan manĝon *difektas*. — Vesto homon *prezentas*.

La urso *ne povas cinci*, / sed ĝi *grumbblas*. — Cikonio *ne povas grumbli*, / sed ĝi *klakas*. — La strigo / kaj la gufo *ne povas klaki*, / sed ili *ululas* (= La strigo *ne povas klaki*, / sed ĝi *ululas*, / kaj la gufo *ne povas klaki*, / sed ĝi *ululas*). — Pigo *ne povas ululi*, / sed ĝi *babilas*. — La kukolo *ne povas babili*, / sed ĝi *kukas*. — Vanelo *ne povas kuki*, / sed ĝi *kvikas*. — La mevo *ne povas kviki*, / sed ĝi *krias*.

## 9

## KAZO AGANTIVO \*

Analizu:

Gazeto estis legata *de l'junulo*.

De kiu estis legata gazeto? — De l'junulo. Do, *de l'junulo* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta la objekton de l'pasiva verbo*.

Tritiko estas semata *de li*.

De kiu estas semata tritiko? — De li. Do, *de li* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta la objekton de l'pasiva verbo*.

Kanzono estos kantata *de l'virino*.

De kiu estos kantata kanzono? — De l'virino. Do, *de l'virino* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta la objekton de l'pasiva verbo*.

La supo estas manĝata *de l'infano*.

De kiu estas manĝata la supo? — De l'infano. Do, *de l'infano* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta la objekton de l'pasiva verbo*.

\* *Agantivo*: el la verba radiko *ag-*, la particeps sufikso *ant-* kaj la neoficiala sufikso *iv-*.

Daŭru analizi:

Gazeto povis esti legata *de l'junulo*.

De kiu povis esti legata gazeto? — De l'junulo. Do, *de l'junulo* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta de objekton de l'pasiva verbo*.

Tritiko devas esti semata *de li*.

De kiu devas esti semata tritiko? — De li. Do, *de li* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta la objekton de l'pasiva verbo*.

Kanzono povos esti kantata *de l'virino*.

De kiu povos esti kantata kanzono? — De l'virino. Do, *de l'virino* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta la objekton de l'pasiva verbo*.

La supo devas esti manĝata *de l'infano*.

De kiu devas esti manĝata la supo? — De l'infano. Do, *de l'infano* estas la *agantivo*, t. e. *la persono plenumanta la objekton de l'pasiva verbo*.

Ankaŭ la nomo de aferoj kaj de animaloj povas stari en *agantivo*:

La tero estas kovrata *de neĝo*.

De kio estas kovrata la tero? — De neĝo. Do, *de neĝo* estas la *agantivo*, t. e. *la afero plenumanta la objekton de l' pasiva verbo*.

Tiu ostro ne povis esti manĝata *de l'hundo*.

De kiu tiu ostro ne povis esti manĝata? — De l'hundo. Do, *de l'hundo* estas la *agantivo*, t. e. *la animalo plenumanta la objekton de l' pasiva verbo*.

Staras en *agantivo* la parolo, kiu respondas al la demandoj: *De kiu estas . . . ? De kio estas . . . ?*



La verbo *kaptili* estas *de* la verbo *kaptili* kaj *de* la verbo *kaptili*.  
*Ekzemploj:* La tablo estis kovrata *de* l' sero.  
 Esperanto estas ŝatata *de* ĉiuj. — La tablo estis kovrata *de* l' sero.  
 visto. — Milda estis laŭdata *de* sia instruistino. — La antikva Grekio  
 estis konkerita *de* l' romanaj legioj. — Tiu tablo estis farita *de* l' ligna-  
 jisto. — La muŝo estus kaptita *de* l' hundo. — Miaj filoj estas amataj  
*de* sia patrino / kaj mia edzino (= Miaj filoj estas amataj *de* sia patri-  
 no, / kaj ili estas amataj *de* mia edzino). — Ĉi tiu malnova mapo mon-  
 tras la dubindan Eldoradon, / kiun estis malkovrita *de* N. N. (= Tiu  
 insulo estis imagita *de* N. N.). — La orfino estis vizitata *de* sia zor-  
 gantino. — Tiu kandelingo estis rompita *de* Alberto / kaj Karlo (= Tiu  
 kandelingo estis rompita *de* Alberto, / kaj ĝi estis rompita *de* Karlo). —  
 Sia vesto estis makulita *de* l' inko. — La laboristoj estis pagitaj *de*  
 l' mastro. — Kafo estis portata *de* kelnero. — La fianĉino estis vidata  
*de* sia fianĉo.

10

AKTIVA VOĈO KAJ PASIVA VOĈO

La propozicioj kiel:

La kato kaptis birdon.

La kato povis kapti birdon.

La kato estis kaptinta birdon.

nomiĝas de *aktiva voĉo*, ĉar la nominativo, nomata aganto, plenumas la  
 objekton de l'esprimo montratan de l' verbo, kaj ties rezultaton ricevas  
 aŭ suferas la akuzativo, nomata agato aŭ paciento.

Sed estas ankoraŭ alia rimedo por esprimi la saman rilaton de kaŭzo  
 al efiko, de origino al rezultato, de produktanto al produktato de mod-  
 difanto al modifato:

Birdo estis kaptita de l'kato.

Birdo povis esti kaptita de l'kato.

En ĉi tiu kazo la propozicio nomiĝas de *pasiva voĉo*, ĉar la nomi-  
 nativo, nomata agato aŭ paciento, ricevas aŭ suferas la objekton de  
 l'esprimo montratan de l' pasiva verbo kaj plenumatan de l' agantivo.

Propozicio kun akuzativo povas ŝanĝiĝi de l'aktiva voĉo al la pasiva voĉo per transformo de l'akuzativo en nominativo-pacienton, kaj de l'nominativo-aganto en kazon agantivo. Kaj la helpverbo *esti* de l'pasiva voĉo devas stari en la samaj tempo kaj modo de l'koresponda aktiva konjugo:

La ĉevalo *tiras* la ĉaron.  
La ĉaro *estas tirata* de l'ĉevalo.

La ĉevalo *devas tiri* la ĉaron.  
La ĉaro *devas esti tirata* de l'ĉevalo.

Ankaŭ kunmetita propozicio kun du akuzativoj povas ŝanĝiĝi de l'aktiva voĉo al la pasiva. Ekzemple:

La ministro nomis *vian filon* / kiel *ambasadoron*.

kaj ĝia ekvivalenta, la propozicio kun klariga komplemento:

La ministro nomis *vian filon ambasadoro*.

transformiĝas en:

*Via filo* estis nomita *ambasadoro* de l'ministro.

La unua akuzativo ŝanĝiĝas en nominativo-agaton kaj la dua akuzativo en klarigan komplementon.

Konklude: la kaŭzo, origino, produktanto, modifanto gramatikaj povas stari en du diversaj kazoj propoziciaj:

1<sup>a</sup> Ili povas stari en nominativo-aganto ĉe propozicio kun verbo de aktiva voĉo:

*Lignisto* hakas arbojn.

2<sup>a</sup> Ili povas stari en agantivo ĉe propozicio kun verbo de pasiva voĉo.

Arboj estas hakataj *de lignisto*.

Kaj la efiko, rezultato, produktato, modifato gramatikaj povas stari en du diversaj kazoj propoziciaj:

1<sup>a</sup> Ili povas stari en akuzativo ĉe propozicio kun verbo de aktiva voĉo:

Lignisto hakas *arbojn*.

2<sup>a</sup> Ili povas stari en nominativo-paciento ĉe propozicio kun verbo de pasiva voĉo:

*Arboj* estas hakataj de lignisto.

Ankaŭ la propozicioj kun verbo de *pasiva voĉo* povas havi dativon:

La pupo estis donacita de li *al Elena*.

La hundido estis aĉetita de l'patro *por lia infano*.

Maljustaĵo devas esti farita *kontraŭ neniu*.

La verda stelo estas portata *por propagando*.

### Ekzemploj:

La operejo estis vizitata *de mi*. — La aŭto estas kondukata *de l'ŝoforo*. — La plumingo estos prenata *de l'komizo* por skribi la fakturon. — Cigaringo estis aĉetita *de l'parencoj* por Peĉjo. — La glavingo estas portata *de l'oficiro*. — La ŝafo estis atakata *de l'leono*. — La nesto estis finita *de l'kolombo*. — La plugilo devas esti trenata *de l'bovo*. — Tiu ujo estis rompita *de iu*. — Mielo estas farita *de l'abelo*. — La kato povis esti mordita *de l'hundo*. — La knabo estis juĝita senkulpa *de mi*. — La arbo estis desegnita granda *de oni*. — Mi ricevis la ordonon *de mia estro*. — La impulso esta donata *de l'motora* al la maŝino.

## 11

### MEDIA LA VOĈO

Legu:

Barbiro	<i>razis</i>	min	(prop. de oblikva formo).
Mi	„	min	( „ „ refleksiva formo).
Ili	„	{ sin reciproke } { unu la alian }	( „ „ reciproka formo).

Barbiro <i>devis raziti</i> min	(prop. de oblikva formo),
Mi " " min	( " " refleksiva formo),
Ili " "	$\left\{ \begin{array}{l} \text{sin reciproke} \\ \text{unu la alian} \end{array} \right\}$ ( " " reciproka formo).

La supraj estas ok propozicioj de *aktiva voĉo*, ĉar ĝia nominativo-aganto plenumas la objekton esprimatan de l' verbo kaj ricevatan de l' akuzativo.

Nun legu:

Mi *estis razita* de barbiro.

Mi *devis esti razita* de barbiro.

Estas du propozicioj de *pasiva voĉo*, ĉar ĝia nominativo-paciento ricevas la objekton esprimatan de l' verbo kaj plenumatan de l' agativo.

"Nun ekzameni de suban propozicion:

Mi *raz — iĝ — is*.

kiu signifas:

Mi  $\left\{ \begin{array}{l} \text{estis} \\ \text{rezultis} \\ \text{aperis} \end{array} \right\}$  *razita*.

"Kion precipe oni volas esprimi en ĉi tiu propozicio estas *ŝanĝo de stato* ĉe l' nominativo, konsiderante malgrava, malĉefa la fakton, se la persono de l' nominativo rezultis razita per sia faro aŭ per faro de barbiro."

"Daŭru legi:

Mi *devis raz — iĝ — i*.

kiu signifas:

Mi  $\left\{ \begin{array}{l} \text{devis esti} \\ \text{devis rezultis} \\ \text{devis aperis} \end{array} \right\}$  *razita*.

"Kion precipe oni volas esprimi en ĉi tiu propozicio estas *ŝanĝo de stato* ĉe l'nominativo, konsiderante malgrava, malĉefa la fakton, se la persono de l'nominativo devis rezulti razita per sia faro aŭ per faro de barbiro."

"Ĉi formo de propozicio nomiĝas *mediala*, ĉar ĝi *montras ŝanĝon de stato* ĉe l'nominativo, sendepende de l'fakto, se tiu ŝanĝo estas plenumata aŭ kaŭzata de l'nominativo mem aŭ de kazo agantivo esprimata aŭ ne en la propozicio" (*Benot*).

La sufikso —*ij* aldonita al transitivaj verboj transformas ĉi tiujn en medialajn verbojn, nome en verbojn, kiuj esprimas nur ŝanĝon de stato —volan aŭ nevolan— ĉe l'nominativo.

Ankaŭ netransitivaj verboj povas preni la sufikson —*ij* por transformiĝi en medialajn:

La flago *pendis*.

La netransitiva verbo indikas la staton de l'nominativo (sen ŝanĝo).

La flago *pend — ij — is*.

La mediala verbo indikas, ke la nominativo ŝanĝis de ia antaŭa stato al la aktuala. La signifo de ĉi propozicio estas:

La flago *ijis pendanta*.

Estas klare, ke verboj esprimantaj momentan agon ne povas ricevi la sufikson —*ij*.

La sufikso —*ij* povas aldoniĝi al vortoj de iu ajn kategorio gramatika: transitivaj aŭ netransitivaj verboj, substantivoj, adjektivoj, adverboj, prepozicioj, afiksoj, k. a. por *formi medialajn verbojn*:

La vortoj kun —*ij* povas preni la karakterizajn finaĵojn de ĉiuj gramatikaj kategorioj: —*o*, —*a*, *e*, —*i* k. a.

Mediala verbo povas formi predikaton sola kiel en:

Unu knabo *sidiĝis*.  
Iuj hundoj *kusiĝis*.  
La parencoj *stariĝis*.

aŭ akompanata de alia verbo: la unu persona kaj la alia infinitivo:

Pluraj knaboj *povis sidiĝi*.  
 Iuj hundoj *komencis kuŝiĝi*.  
 La parencoj *devas stariĝi*.

Ankaŭ ĉi tie la predikato povas necesi la aldonon de adjektivo — atributo — por kompletigi sian signifon:

La ĉielo *iĝis ruĝa*.  
 Lia karaktero *fariĝis malgaja*.  
 Enriko *deziras fariĝi utila*.

aŭ la aldonon de atributo konsistanta el substantivo:

Li *elektiĝis prezidanto*.  
 La studento *volas fariĝi soldato*.  
 Enriko *deziras fariĝi inĝeniero*.

Kiam en mediala propozicio esprimiĝas la kaŭzo de l'statŝanĝo ĉe l'nominativo, tiu prezentiĝas sub la gramatika formo de *kaŭza komplemento*. Ekzemploj:

La flago *pendiĝis de l'vento*.  
 Ĉiuj *eksektiĝas pro ĝojo*.

Ankaŭ mediala predikato povas havi dativon:

La mastrino *fariĝis afabla al ĉiuj*.  
 Mia laboro *fariĝis ŝatinda por ili*.  
 Ne fariĝu maljusta *kontraŭ iu*.  
 La lernantoj *leviĝis por saluti sian instruiston*.

Generale inter *iĝi* kaj *fariĝi* estas la diferenco, *ke iĝi* indikas nur ŝanĝon ĉe afero jam ekzistanta, dum *fariĝi* indikas ankaŭ kreiĝi.

#### *Ekzemploj:*

Tiu kandelingo *rompiĝis*. — Via domo *konstruiĝas*. — La infano *malŝaniĝis*. — La blua, ruĝa flamo *estingiĝis*. — Tiu ĉi maljunulo *tute malŝagiĝis* / kaj *infaniĝis* (= kaj li *tute infaniĝis*). — Tiu persono *fariĝis*

lerta. — Li fariĝis teda *al ĉiuj*. — La fraŭlino aliĝis *al nia Esperanta klubo*. — De zorgoj, / ne de jaroj blankiĝas la haroj (= De zorgoj blankiĝas la haroj, / ne de jaroj blankiĝas ili). — Li paliĝis *de timo*. — Mia vesto malpuriĝis *de l'koto*. — Mia ombrelo difektiĝis *pro pluvego*. — Branĉoj fleksiĝas pro pezo. — Kiam mi turniĝas, / mi povas esti turnata, / sed povas esti ankaŭ, / ke mi turnas min men.

Nova asocio ekfondiĝis. — Sidiĝu, sinjorino. — Eksidu, sinjoro. — La leporo ekkuris. — La flago ekpendis. — La etulino prenis sianupon / kaj ekludis (= kaj ŝi ekludis).

## 12

## DEKLINACIO

Propozicio estas konglomero de paroloj, kiu *enhavas kompletan person kun klara kaj sendependa senco*. La apartaj funkcioj plenumataj de ties vortoj en la propozicio nomiĝas *kazoj*. La serio de l'kazoj formas la *deklinaĉion*, nome la diferencajn poziciojn okupataj de l'vortoj en propozicio.

La kvar kazoj de l'deklinacio estas:

nominativo.  
akuzativo.  
dativo.  
agantivo.

kiuj en propozicio kombiniĝas jene:

AKTIVA VOĈO.	PASIVA VOĈO.	MEDIALA VOĈO.
nominativo.	nominativo.	nominativo.
akuzativo.	agantivo.	dativo.
dativo.	dativo.	

Nominativo estas la kaŭzo, origino, produktanto, modifanto de l'objekto esprimata de verbo aŭ predikato en aktiva propozicio; kaj la efiko, rezultato, produktato, modifato en pasiva propozicio. En mediala propozicio nominativo estas la gramatika persono ĉe kiu realiĝas la objekto esprimata de verbo aŭ predikato.

Akuzativo ricevas rekte la objekton faratan de nominativo kaj esprimatan de verbo aŭ predikato en aktiva propozicio.

Dativo indikas personon, animalon aŭ aferon al kiu sin direktas

aŭ destinas la objekto esprimata de verbo aŭ predikato kaj plenumata de nominativo en aktiva propozicio; kaj plenumata de agantivo en pasiva propozicio; kaj realigata ĉe nominativo en mediala propozicio.

Agantivo estas la kaŭzo, origino, produktanto, modifanto de l'objekto de l'diro, esprimata de verbo aŭ predikato en pasiva propozicio.

Deklinacio implicas koncepton de interrilato inter la diversaj kazoj ligataj inter si de verbo aŭ predikato.

Ni *donu* animon al nia lingvo.

Animo *estu donita* de ni al nia lingvo.

Animo *donigu* al nia lingvo.

La paroloj *ni*, *animo*, *lingvo* estas sendependaj, ĝis ili ne fariĝas membroj de propozicio. Sed integrinte propozicion, ili perdas sian sendependecon kaj troviĝas *submetataj al la governo de l'verbo aŭ predikato* de l'diro. La kazoj de propozicio estas *faktoroj* ne mankeblaj por la klara kaj plena esprimo de l'penso. Se unu el ili mankus, la diro restus nekompleta kaj ĝia signifo stumpa.

Akuzativo estas indikata de l'finaja —*n* aldonita al la vortoj; dativo kaj agantivo estas signalataj de l'respektivaj prepozicioj antaŭmetitaj al substantivo; nominativo distingiĝas per manko de ia aparta signo.

Tamen atentu, ke la prepozicio *por* enkondukas la dativojn de favoro kaj de celo, kaj la prepozicio *de* enkondukas la agantivon kaj la kaŭzan komplementon, tial ne la prepozicioj, sed la funkcio plenumata de l'vortoj ĉe esprimo, la pozicio okupata de l'paroloj en propozicio, signas las respektivan kazon.

Ne nur Esperanto sed ankaŭ ĉiuj aliaj idiomoj postulas klaran komprenon pri l'kazoj de l'deklino por povi paroli korekte.

“Sen materialoj —klarigas Benot— sen brikoj, fero, ligno, estas nek domoj nek konstruaĵoj iaspecaj; tamen ĉi tiuj materialoj estas nek domoj nek konstruaĵoj. Post tertremo ilin faligintaj, ĉi ĉiuj materialoj ekzistas ankoraŭ, sed sen povi esti rezidejo por iu.

“Analoge oni devas proklami, ke sen vortoj oni ne parolas; tamen ne en la vortoj sidas *la esenco de l'parolado*. Oni parolas *ordigante la vortojn*, nome *rilatigante la vortojn unu kun alia*.

“Kio permesas al la decimala sistemo reprezenti iun ajn kvanton nur per naŭ ciferoj? *Sistemo*. Ĉiu cifero, krom sia absoluta valoro, posedas valoron de *pozicio* kreskanta aŭ malkreskanta laŭ ĝia situo dekstre aŭ maldekstre de iu komenca punkto.

“Same la arto paroli ne sidas en la vortoj, sed en *metoda organiza-*



*do de sistemo de vortoj.* La elementoj de idiomo, kiel ili troviĝas en vortaro, estas la *materialoj de l'parolado*, sed ne la esprimo pri io.

"—*a*, —*as*, *bril—*, *cel—*, *dens—*, —*et*, *la*, *lum—*, *mal—*, —*o*, *tra*, k. t. p. estas vortoj, estas paroloj . . . estas nenio: estas mortaj materialoj atendantaj la vokon de granda arkitekto, kiu donu al ili vivon. Kaj ĉi arkitekto estas la *konstruo*, estas la *deklino*, estas la *sintakso*, kiu kunordigas la vortojn en *propozicion*.

"Diru iu granda arkitekto: «Mortaj materialoj! vekigu al senmorta vivo, viciĝu, ordigu», kaj tuj aperos la celverko:

Tra densa mallumo briletas la celo."

Studi tiel la gramatikon, estas studi la *penso*.

El la verko "LERNU ESPERANTON" de L. L. Zamenhof, 1909. (1909)

Se terminó de imprimir el día  
treinta de septiembre de mil  
novecientos cuarenta y siete en  
los talleres gráficos de la Com-  
pañía Impresora Argentina,  
S. A., Alsina 2049-Buenos Aires.

Tiu ĉi libro finpresigis je la  
trideka de septembre de mil  
naŭcent kvardek sepa ĉe Com-  
pañía Impresora Argentina,  
S. A., Str. Alsina 2049. Bonaero.

En preparo:

DANIEL QUARELLO

# LERNU ESPERANTON

DUA EKSTRAKTO

*La prepozicioj.*

*La komplementoj de l' substantivo.*

*La atributo de l' substantivo.*

*La komplementoj de l' substantivo.*

*La komplementoj de l' substantivo.*

*La komplementoj de l' verbo.*

*La libera akuzativo.*

*La komplementoj de tempo.*

*La komplementoj de loko.*

*Aliaj komplementoj de l' verbo.*

*La kunmetitaj prepozicioj.*

*La formo rekta kaj la formo nereкта.*

QUARELLO & Cía.

Eldonistoj

Buenos Aires

U. E. A.

**U N I V E R S A L A  
E S P E R A N T O —  
A S O C I O**

**La Centra Oficejo de Esperanto**

*Servaro: PALAIS WILSON — GENEVO (SVISIO)*

*Administrado: HERONSGATE, RICKMANSWORTH (HERTS.)  
(ANGLIO)*

---

**VENDOPREZO:** \$ 1.— argentina mono aŭ 5 internaciaj respondkuponoj